


BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 13.

A p r i l o 1954

Aperas laŭbezone

NUNA SINTENO DE ESPERANTA MOVADO

Itala gazeto "L'esperanto" (Torino) aperigis en la 20a numero, sub la sama titolo pensigan studaĵon de G.C. Fighiera pri la ĉefa karakterizilo de nia movado samtempa: La neceso interne firmigi la movadon laŭ la postuloj de la internacia situacio kaj surbaze de nia jam delonge akirita maturiĝo. Unu el la vojoj al tio kondukas tra la asocioj. D-ro Lapenna emfazis en sia fama studaĵo "La grupo: kerno de nia movado" (HDE) la tezon, ke niaj grupkunvenoj fariĝu kulturaj centroj kaj donis devizon pli altigi la kulturan nivelon de niaj asocioj. La devizo oficialiĝis, kaj la tuta movado akceptis ĝin, kiel pravas la rezolucioj de niaj lastaj Universalaj Kongresoj. Gravajn rezonojn de tiu-ĉi aktuala celado ni trovas dum la lasta tempo en la esperantista gazetaro svisa, sveda, franca, itala, germana kaj en la organo de UEA. La diskutado disfloras en ĉiuj gazetoj, ĉiam interesa, ĉiam eduka. Ĝi pravas ankoraŭfoje la mirindan firmecon kaj unuanimecon de nia hodiaŭa sinteno. Ni, domaĝe, povas nur tre koncize resumi ĉi tiun aktualan studaĵon!

- -

J.M.

Ĉeĥa kunlaboro en japana verko.

Ni dediĉis en nia Bulteno nro 12 ĉefartikolon al tiu ĉi temo, ĉar ni atribuas al ĝi eksterordinaran gravecon. Ni petas ĉiujn legantojn, ke ili penu deĉifri tiun - pro kulpo de la multobliga maŝino - malbonege legeblan artikolon kaj dediĉu al ĝi konvenan atenton. Ni ripetas ĉi tie almenaŭ la adreson, al kiu estu ĉiuj kontribuajtoj (artikoloj kaj desegnoj faritaj de infanoj) sendotaj: Redakcio de Heibon-Sa, Infana Fako, N-o 4, Yomban-tyo, Kozimati, Tiyo-da-ku, TOKIO.

- -

Grandega Esperanto-ekspozicio en Montevideo

estos aranĝata tie okaze de la Ĝenerala konferenco de UNESKO. Ni intencas per tiu ĉi ekspozicio informi tiun ĉi gravan konferencon, kiu traktos ankaŭ la aferon de Esperanto, pri ĉio, kio estis publikigita en nia lingvo. Estas dezirinde, ke ankaŭ Ĉeĥoslovakio estu en la ekspozicio digne reprezentita kaj ni direktas tial al ĉiuj la urĝan peton, ke ili sendu por tiu ĉi celo al s-ro Rodolfo Garcia, Calle Yaguaron 1397, Montevideo, Uruguay ĉiujn gravajn Esperanto-eldonaĵojn (librojn, gazetojn, broŝurojn, gvidfoliojn ktp.), aperintaj en nia lando. Eble estos preferinde el Ĉeĥoslovakio aranĝi la sendaĵon el unu loko kaj ni deklaras nin pretaj kolekti la materialon kaj ekspedi ĝin, se ĝi alvenos al nia adreso baldaŭ kaj en inda amplekso. Se vi ekspedis senpere al Uruguay, bonvolu nin informi.

- -

Heroldo de Esperanto rozesiláme na velký počet adres, které nám administrace dodala. Další čísla Herolda budou ale dostávat jenom ti, kteří zaplatili na výlohy Kčs 12,-. Vydavatelství dodává časopis zdarma, protože není možno jej odtud předplatit. Prosíme, aby nám ihned vrátil dodaná již čísla, kdo nemá o tento časopis zájem.

Programoj de klubaj vesperoj de Esperantista Klubo en Praha (ĉiumerkrede je la 20a horo en Praha II, Smečky, Ženský klub):

- 7.4. Jar. Mařík: Literaturaj ĉapitroj
14.4. Antaŭ 37 jaroj mortis la Majstro.... Solena vespero de E. Suchardová
21.4. RNDr. prof. M. Pulchart: Nitrogeno de viva naturo.
28.4. J. Steklý: El Svisa antologio (IIa parto).
5.5. J. Šustr: Antaŭ naŭ jaroj
12.5. Prof. Št. Urban kaj ceteraj: Verko de Smetana (okaze de lia morto antaŭ
70 jaroj). Kun muzikaj verkeroj.

- -

MUDr. František V A N Ě K 70jara.

La 28an de marto nunjara festis sian sepdekan jaron nia fidela laboranto dum jardekoj, ĉefa aktivulo en la regiono de Karlovy Vary, virtuoza violonĉelo aktivinta kaj aktivanta en pluraj kvartetoj, ŝakisto de alta klaso. Lia koro ĉiam brulas por ĉio nobla, kio plibeligas la homan vivon. Al la kora gratulo de nia klubo ni aldonas same koran gratulon de sveda samideano Anna Alamo-Sandgren, kies leteron ni ĵus ricevis.

- -

Letero al Bulteno de Praha:

Brave agas vi, praganoj,
nepre vi ne pigras
preskaŭ jam el viaj manoj
mil Bultenoj migras.

Vi kolektas la paperon,
verkas por aprezo,
sed finfine la aferon
fuŝas ftiza preso.

Kaj aldone Verda Voĉo -
duo bonenhava,
endas tamen sol-riproĉo
a klopodo grava:

Ĵus ja, venis la Bulterno
plena de raporto,
sed legeblas nur kun peno
ĉiu tria vorto!

Pluan kreskon mi deziras,
kara vi duopo,
tamen zorgu, mi konsilas,
ankaŭ pri la robo.

Jiří Kořínek, 9.3.1954

- -

El la letero de Raymond Schwartz:

Mi devas ankaŭ danki pro via Bulteno. Ĝi estas jes modesta, sed tre lerte redaktita kaj interesa laŭ multaj vidpunktoj. El ĝi mi lernis kun plezuro, ke mia amiko Baghy - pri kiu, post la lasta Universala Kongreso, oni rakontis ĉi tie maltrankviligajn aferojn - estas ankoraŭ vivanta kaj ĉiam obstine fervora. Mi rondirigos la Bultenon inter niaj geamikoj, por ke ĉiuj sciu, ke ankaŭ en via lando oni vivtenas la esperantan fajron ...

- -

El la letero de Gösta Henriksson:

La leteron kun la Bultenoj mi bone ricevis. Kun granda intereso mi tralegis ĉiujn, kaj mi komprenas la grandan, jes, ni diru amplenan laboron, kiu troviĝas malantaŭ la redaktado kaj pretigo de tiuj simplaj folioj, tiel valoraj unue por la klubanoj mem kaj due por ĉiuj ceteraj samideanoj. Mi ĝojas pro via promeso, ke mi de nun ricevos la Bultenon regule. Posta la tralego mi metos ĝin sur la gazetbreton en nia klubejo inter aro da aliaj gazetoj ...

- -

Anna Alamo-Sandgren, bone konata al ĉeĥoslovaka esperantistaro, salutas sincere siajn geamikojn!

PAUL NYLÉN, nia sveda veterano, sendas salutojn al la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Li estas nun en sia 84a vivjaro kaj ni estas feliĉaj leginte en lia afabla letero, ke li vigle laboras sur nova eldono de vortaro Esperanto-sveda, nun presata.

-

Nia movado en Slovakio: Esperanto vivas en Bratislava, Harichovce, Košice, Martin, Poprad, Prakovce, Spišská Nová Ves kaj Svit. Du grupoj ekzistas en la kadro de ZKROH.

-

Esperanto en la Palaco de Nacioj. Por la unua fojo Esperanto estis publike parolata en la Palaco de Nacioj, la eŭropa sidejo de UNO, en Ĝenevo. Dank' al la iniciato de s-ro Ralph Harry, ĝen. konsulo de Aŭstralio en Ĝenevo kaj aktiva esperantisto, okazis tie la 18.12.1953 informa prezento, klarigata en Esperanto, de la kolora sonfilmo "Aŭstralio hodiaŭ". Ĉeestis personaro de la sidejo kaj aro da konataj esperantistoj, inter ili prof. Dro Edm. Privat.

HDE

-

En Indonezio la Esperanto-movado bone progresis dum la lastaj jaroj. Kursoj okazis i.a. en Medan kaj Tandjung-Balai, ambaŭ sur insulo Sumatro. La kursanoj estis precipe gejunuloj.

HDE

-

Sardinia urbeto Zamenhofas projektita. Ekzistas projekto konstrui urbeton ĉe la nordorienta marbordo de Sardinio. Kelkaj samideanoj proponis por ĝi la nomon Zamenhofas.

HDE

-

Esperanto en la astronomio. En la elementaj lernolibroj oni klarigas, ke inter la astrovojoj de la planedoj Marso kaj Jupitero ekzistas la asteroidoj. Hodiaŭ oni konas preskaŭ mil sescenton de tiuj ĉielkorpetoj. Ĉi tiuj malgrandaj planedoj, inter kiuj estas unu, kies diametro estas nur 500 metroj, bezonas nomojn. Komence oni donis al ili la nomojn de la geherooj el la antikvaj mitologioj. Sed tiuj nomoj baldaŭ elĉerpiĝis.

En la finnlanda urbo Turku laboras famkonata astronomo, malkovrinto de multaj kometoj kaj malgrandaj planedoj. La asteroido nro 1421 ricevis la nomon "Esperanto" kaj la asteroido nro 1462 la nomon "Zamenhof".

Certe ĉiu esperantisto ĝojegos aŭdante, ke la famo de Esperanto kaj de ties kreinto tiel atingos eĉ la ĉielon kaj ke ĉirkaŭ la Suno cirkulas du planedoj kun nomoj al ni ĉiuj tre karaj.

La Praktiko

-

Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Brazilo.

En brazila urbo Rio de Janeiro antaŭ du jaroj estis fondita Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Tiu ĉi Kooperativo nun havas jam 200 membrojn kaj komunan kapitalon egalan al pli ol 100 000 Kĉs. Tamen pli interesa ŝajnas esti la programo por estonta tempo. Jen aŭdu: Kiam la nombro de la anoj atingos 300, aĉeti propran konstruaĵon, kie estos instalita la librovendejo. Kiam estos 500 anoj instalí modernan eldonejon en la ĉirkaŭaĵo de Rio de Janeiro. Post la aliĝo de 750 anoj, hotelon-restoracion kiel servon al la anoj kaj al la publiko. Atinginte 1000 anojn, konstrui propran domon por libertempado. Certe Esperanto en praktiko!

Laŭ La Praktiko

-

Členy klubu, kteří ještě nezaplatili své příspěvky, naléhavě žádáme, aby nám je poukázali co nejdříve. Jen včasným zaplacením příspěvků můžeme i my plnit své povinnosti vůči členstvu. Všem, kteří členský příspěvek poslali, budeme nadále Bulteno pravidelně zasílat.

-

Kiuj radiostacioj elsendas nuntempe en Esperanto. Lunde elsendas hispana stacio LA CORUÑA, VIENO kaj nederlanda HILVERSUN. Marde ni povas sekvi svisan programon el BERNO, urugvajan el MONTEVIDEO, VIENAN programon aŭ duonhoran varion el VALENCIA. Merkrede posttagmeze anoncas sin GRAZ el Stirio, vespere ROMO, BARCELONO kaj HILVERSUN. Ĵaŭde matene bonvenigas nin programoj de sudfranca stacio LILLE kaj de ĉefstacio de PARIZO. BERNO sin anoncas ĵaŭde dufoje kaj la tagon finas programo el ZAGREBO. Ankaŭ vendrede aŭskultemaj esperantistoj povas sekvi programon de la stacio ROMO. Semajnon finas brazila RIO DE JANEIRO per sia matena programo kaj HILVERSUN per sia nokta kvinminuto. Esperantistoj do ne povas plendi pri malriĉo de radioparolataj programoj. Tamen estus dezirinde aŭdi denove nian Verdian Stacion, kiu pro siaj artaj programoj certe atingis la mondfamon!

-

La plej aĝa kongresanino por Haarlem verŝajne estos F-ino Anne E. Beatty el Cardington en la usona ŝtato Ohio. En julio ŝi fariĝos 96-jara. Malgraŭ sia alta aĝo ŝi estas ankoraŭ sana kaj vigla, kaj ŝi antaŭĝojas pri la vojaĝo al Eŭropo kaj pri la Universala Kongreso. HDE

-

Ĉu vi jam aliĝis al Doksy? Ne ankoraŭ? Aliĝu tuj al s. Václav Špŭr, Doksy u Máchova jezera, Moskevská ul., kiu sendos al vi ĝustatempe ĉiun bezonan informmaterialon.

-

Naskiĝo: Al gesamideanoj Leo Novotný el Liberec naskiĝis la 27.I.1954 filineto Soňa. Sincere gratulas Esp. klubo en Liberec kaj en Praha.

-

Atingis nin malĝoja sciigo pri morto de fervora longjara samideano Stan. Knížek el Liberec. Ni tre bedaŭras la forpason de tiu ĉi bona homo!

-

NOVAJ KURSOJ:

Liberec: Nova kurso kun 10 lernantoj estas gvidata de s-ano F. Pytloun.

-

Přerov: Esperanto Rondeto aranĝas novan kurson kun 28 lernantoj. 20 kursanoj de ĵus finiginta kurso submetiĝis al la ekzameno kaj sukcesis. Ĉiuj vizitas daŭrigan kurson. Ĉiuĵaŭde okazas kunvenoj diligente vizitataj.

-

El plej diversaj lokoj de nia ŝtato ni ricevas entuziasmigajn leterojn, kiuj esprimas dankojn de nia samideanaro pro nia modesta Bulteno. Tre bone ni scias, kia ĝi devus esti kaj tre volonte ni enmanigus al niaj membroj kaj amikoj modelan Bultenon, sed ofte ni devas preskaŭ rezigni. Kvankam ĉiu numero portas simplan rimarkon "Aperas laŭbezone", ĝis nun ni sukcesis aperigi ĝin regule dum sinsekvaj 12 monatoj. Ni esperas la samon por la proksima estonto. Refoje ni esprimas nian plej sinceran dankon al ĉiuj, kiuj per alsendo de prespapero, de monsubtenoj, de instigaj vortoj helpas al ni. Same ni dankas al ĉiuj esp. redakcioj pro regula alsendo de siaj presorganoj, el kiuj ni tre ofte peras informojn. Por s. Kořínek: Ni penos, ke estonte almenaŭ ĉiu dua vorto estu legebla! Dankon! -jelĉ

-

Pre kurzy a samoukov doporučujeme VEL'KÚ UČEBNICU ESPERANTA od J.V.

Dolinského. 128 strán. Ilustrácie. L'udové piesne s notami.

Cena 12 Kčs (aj s poštovným).

Máte už pohl'adnice z Trenčína a okolia s esperantským textom?

Učebnicu aj pohl'adnice dodá: Ján Lamačka, Trenčín, Pod Sokolicami 1675.

Eldonas EK ĉe OB 2 en Praha.

Eldonkvanto: 800 ekzempleroj.

Proksima numero aperos komence de majo kun dupaĝa aldono "Verda Voĉo".

Koresponda adreso: s. Jaroslav Šustr, Praha I., Dlouhá tř. 10.